

Johann Wolfgang von Goethe,

La rozeto

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Knabo vidis – jen rozeto
 Sur la kampo staras;
 Bela, juna la floreto . . .
 Vive kuras la knabeto,
 Ĝojas, miras, flaras.
 Sur la kampo la rozet'
 Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros
 Belulinon mian »;
 Floro diris : « vi foriros, –
 Per pikiloj mi disŝiros
 Tuj la manon vian ».
 Sur la kampo la rozet'
 Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante
 La rozeton prenis, –
 La floreto batalante
 Sin defendis pikadante,
 Sed la sorto venis.
 Sur la kampo la rozet'
 Kiel infanet'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Dornrozeto

tradukita de Kálmán Kalocsay

Vidis knab': Jen, juna flor'!
 Rozujet' kampara!
 Bela, kiel la aŭror'!
 Li alkuris ĝoje por
 Vidi, kiel kara!
 Rozo, rozo, ruĝa roz',
 Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,
 Rozujet' kampara.
 Diris roz': Mi boras vin,
 Ĉiam vi memoras min,
 Pro l' dolor' amara.
 Rozo, rozo, ruĝa roz',
 Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do
 De l' rozuj' kampara,
 Ĝi, defende, pikis tro!
 Sed ne helpis ve kaj ho
 Kontraŭ vol' barbara.
 Rozo, rozo, ruĝa roz',
 Rozujet' kampara.

...

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.